

*Unesko post la elekto de nova ĝenerala direktoro:*

# Ĉu Audrey Azoulay povos savi Uneskon ?

**La araba mondo estas ĉagrenita, Usono kaj Israelo anoncis, ke ili forlasos la mondorganizaĵon, la financado estas en danĝero, Unesko en la krizo  
Rolo de la Esperanto-movado**

La nova ĝenerala direktoro de UNESKO nomiĝas Audrey Azoulay. La 10an de novembro 2017 ĉi tiu 45-jara francino estis elektita en Parizo, per 131 poraj kaj 19 kontraŭaj voĉoj, kiel posteulino de Irina Bokova. Azoulay estis proponita de la Ekzekutiva Konsilio de UNESKO pri kulturo, klerigo kaj scienco, kun la apogo de la aktuala prezidento Macron. En la historio de ĉi tiu mondorganizaĵo ŝi estas la kvina eŭropano, la dua franco kaj la dua virino ĉe la pinto de la gvidado.

Azoulay estis elektita anstataŭ Hamad Bin Abdulaziz Al-Kuwari el Kataro. Sed ĉar la katarata kandidato estis bojkotita de Saŭdarabio kaj Egiptio, kiu prezentis propran kandidaton, Azoulay gajnis la konkurson kvazaŭ en la senco de kompromiso, kaj por eviti unu el la du aliaj. La judoj riproĉis al Kuwari antisemitismon. En la araba mondo regas nun altgradaj ĉagreno kaj frustrigo.

Kiu estas Audrey Azoulay? Naskita la 4an de aŭgusto 1972 en Parizo, Azoulay devenas de familio kun jud-maroka origino. Ŝi estas la filino de André Azoulay, kiu estas influa personeco en Maroko kun rektaj konsilaj rilatoj al la reĝo, kaj la filino de la verkistino Katia Bami. Audrey Azoulay studis komercan (aŭ entreprenan) ekonomion en la elitulaj universitatoj Paris-Dauphine kaj Lancaster kaj en la altlernejoj Science Po Paris kaj ENA kaj havas la akademian gradon de mastro. Dum sia studado ŝi laboris en banko, poste en la franca kulturministerio kaj en la financa kontrolado pri la publika administrado. Post aktiveco en la Nacia Centro de la kino kaj filmo ŝi estis vokita, en 2014, al la pariza Elizeo, kie ŝtatestro François Hollande nomumis ŝin konsilisto pri kulturo kaj komunikado. Post renovigo de la franca registaro ŝi fariĝis, la 11an de februaro 2016, ministro pri kulturo kaj komunikado en la registaro de Valls II kaj konservis tiun ĉi postenon ankaŭ en la registaro de Cazeneuve, ĝis la 15a de majo 2017. Azoulay estas edzino kaj patrino de du infanoj.

Azoulay ŝatis politikumi jam en sia lerneja tempo. Ŝi konsideras sin, krom „civitano de la mondo“, politike maldekstra kaj staras proksime de la Socialisma Partio, kiun ŝi konsiladis pri kulturaj aferoj, tamen sen esti ĝia membro. En aŭtuno 2016 ŝi pasie pledis por multflanka kaj unueca Eŭropo.

El kultura vidpunkto, la nova ĝenerala direktoro de Unesko kombinas tri diversajn civilizojn: la Okcidenton, la araban mondon kaj la judecon. El tiu perspektivo ŝia elekto estas ideala solvo. Multaj observantoj opinias, ke en la nuna situacio de Unesko gravas unuavice la deveno kaj personeco anstataŭ la profesia signifo aŭ diplomatia kariero de la postenulo. Almenaŭ bonaj intencoj certe ekzistas: Laŭ Azoulay, Unesko „devos fariĝi la morala kaj intelekta konscio de la homaro“.

Sed la novan ĝeneralan direktorinon atendas gravaj defioj por solvi: La ĉefaj taskoj de la nova gvidanto estas solvi la aktualan krizon en Unesko, doni al ĝi freŝan orientiĝon, klaran identecon kaj trovi novajn financajn fontojn, ĉar Usono ĉesigis siajn pagojn jam en 2011. Usono kaj Israelo eĉ anoncis, ke ili forlasos la mondorganizaĵon, kaj ankaŭ aliaj membroŝtatoj kiel Germanio postulis, ke Unesko estu reformita kaj fariĝu pli efika kaj pli transparenta organizaĵo. Ne sufiĉas esti nur respondeca pri la listo de la monda kultura heredaĵo. Certe, necesas pli forta protektado de tiu heredaĵo, kiu estas minacata de detruo pro militoj kaj atakoj fare de religiaj kaj kulturaj fanatikuloj, precipe en islamaj landoj. Sed necesas ankaŭ pli konkrete agi sur la kampoj de la edukado kaj klerigo, scienco kaj komunikado. Necesas pli forta engaĝiĝo sur la kampo de la amaskomunikiloj, kies sendependeco kaj libereco (ankaŭ de eraraj informoj) devas esti protektataj. Ŝajnas, ke Azoulay konscias pri tiuj problemoj kaj ke Unesko estas reformenda, kvankam ŝi ankoraŭ ne prezentis konkretan planon. Azoulay devos interpacigi la diversajn konfliktajn tendencojn, precipe arabojn kaj judojn. Ŝi devos klopodi, por ke Usono kaj Israelo restu aktivaj en la mondorganizaĵo, kiun Israelo intencas forlasi el protesta sinteno, ĉar Unesko bonvenigis Palestinon kiel plenan membron kaj aprobis la proponon, ke la urbo Hebron fariĝu monda kultura heredaĵo de la palestinanoj. Por Israelo tio tute ne estas akceptebla. Do, Azoulay devos konsideri kaj la interesojn de

Israelo kaj la deziroj de la palestinanoj. Usono volas turni al Unesko sian dorson, ĉar ĝi opinias, ke ĝi devas pagi tro multa da mono. La sukceso estas garantiata nur, se Unesko fariĝos malpli politika, malpli ideologia kaj pli kultura asocio, kio iusence estis la revo de la franca antaŭulo René Maheu (1959-74). Azoulay, kiu ne disponas pri aparte multaj politikaj spertoj, povas sukcesi nur, se ŝi kapablos apliki sian diplomatian instinkton favore al la bono kaj se la dialogo kun kapricaj kaj malfacilaj ŝtatoj estos fruktodona. Pri la intenco de Usono kaj Israelo Azoulay estas konvinkita, ke estas malbona ideo forlasi la organizaĵon. Sen la membreco de Usono, kiu pagis ĝis nun 22% de la mastrumado de Unesko, en la organizaĵo malfermiĝos granda financa truo. Cetere, ankaŭ Japanio reduktis siajn pagojn. Fakte, la kritiko de Unesko komenciĝis jam sub Barack Obama, do la ideo forlasi Uneskon ne estas nova aŭ nura kaprico de lia posteulo Donald Trump, kiu ja sendube havas tre malfavoran opinion pri Unesko kaj similaj organizaĵoj. Do, Unesko devos ŝparadi. Alia timo estas, ke en Unesko regos troa influo de ŝtatoj, kiuj reprezentas diktatoran aŭ duondiktatoran reĝimon, de ŝtatoj, en kiuj la homaj rajtoj kaj la libereco de la gazetaro estas grandstile lezataj. La tutaj klopodoj pri homaj rajtoj do povus esti kondukita al la absurdo. Iam la Okcidento rilatis skeptike al Unesko, ĉar ĝi suspektis ĝin pro kontraŭ-okcidenta sinteno, kiu estis forte disvastigata en la emancipiĝanta „Tria Mondo“. La ĉefa simbolo de tiu erao estis ĝenerala direktoro Amadou Mahtar M'Bow el Senegalio, kiu cetere prezentis sin kiel fervoran simpatianton de Esperanto, kion la Esperanto-movado aplaudis kun blinda favoro.

La esencan kritikon pri UNESKO esprimis precipe dekstraj gazetoj kiel *Neue Zürcher Zeitung* kaj *Die Welt*, kiuj tradicie skeptike rilatas al „ĉio maldekstra“. De tiu ĉi flanko la juĝo pri la UN-sistemo estas entute detrua. Nature, la opinio pri la katarata kandidato estis dekomence malbona, ne nur en dekstraj medioj, ĉar tiun ĉi kandidaton multaj komentistoj konsideris apriorie maltaŭga, ĉar li reprezentas ŝtaton kun altgrada korupto kaj grandstila lezado de la homaj rajtoj, se oni pensas ekzemple pri la problemoj ĉirkaŭ la futbalo. Do, ŝajnas, ke rilate la ĉefpostenon de Unesko ankaŭ en ĉi tiu kazo korupto (kiu estas internacia problemoj) ludis iun rolon, ĉar oni supozas, ke Kataro simple volis „aĉeti“ ĝin. Laŭ la egipta kandidato Khatib, la araba mondo tamen estis en la vico por ricevi la postenon, sed la araboj mem fuŝis la aferon. Kaj la Ekzekutiva Komitato, kiu sole havas la kompetencon elekti la ĝeneralan direktoron de Unesko, surprize voĉdonis favore al la francino por fini la kverelon inter la araboj. Prave!

Laŭ la germana gazeto *Die Welt*, Unesko troviĝas minimume en la sama marĉo de la korupto kiel la futbala mondorganizaĵo FIFA. Por tiu gazeto la UN-sistemo estas simbolo por fuŝa ekonomio en si mem. UN estas komparata kun la sistemo de Sepp Blatter kaj la organizaĵo mem estas misfamigita kiel „maŝino por lavi la monon de diktatoroj“. Forta tabako! Kun zorgo oni observas, ke tro da koruptaj ŝtatregimoj diktas la tonon en UN kaj en ĝia „Homrajta Konsilio“, kie sidas multaj ŝtatoj, kiuj mem grandstile lezas la homajn rajtojn en siaj landoj. La gazeto demandas sin, ĉu la okcidentaj landoj ankoraŭ kapablos kaj kuraĝos defendi siajn (universalajn) valorojn en tiuj gremioj, en kiuj certaj membroj ŝajne cinike rilatas al tiuj valoroj, aŭ ĉu ili simple akceptas la situacion kia ĝi estas. Simbola por tiu evoluo estas la fakto, ke Germanio fiaskis kun sia deziro daŭrigi sian mandaton en la Ekzekutiva Konsilio de UNESKO, kiu konsistas el 58 membroj. Sed anstataŭ Germanio estis elektitaj Finnlando, Portugalio kaj Turkio. Nu, bone, kiu konas la sistemon de tiuj organizaĵoj, scias, ke ĉiuj ŝtatoj strebas membriĝi en tiuj gremioj kaj konsilioj. La membrecoj ŝanĝiĝas de jaro al jaro, kio kaŭzas, ke en tiuj gremioj kaj konsilioj alterne sidas ĉiuspecaj dubindaj ŝtatoj (nu, ankaŭ tiuj ŝtatoj havas ekzistorajton) kune kun demokratiaj landoj. Ĉar la postenoj en tiuj mondorganizaĵoj estas ege allogaj por certaj politikistoj kaj diplomatoj, estas kompreneble, ke multaj ŝtatoj volas ilin akapari, ĉar ili estas utilaj por la propra prestiĝo kaj por la kariero de la koncernaj politikistoj kaj diplomatoj, kiuj malmulte interesiĝas pri la farto de la mondo mem, kiel nete imputas la gazeto *The European* al ili.

Kaj Esperanto? Per la elekto de la judino Audrey Azoulay ekzistas la potencialo, ke Unesko daŭre konservos sian tradician favoron rilate al la Esperanto-movado, kiun ĝi flegetis en la pasinteco per rezolucioj kaj bondeziraj telegramoj. Ke la Esperanto-movado povos atendi pli multe flanke de tiu organizaĵo ol formalajoj laŭ la ĝisnuna burokratia stilo, estas tamen dubinde. Nature, multo dependas de la aktiveco de la Esperanto-movado mem, kiel ĝi plurilatos kun Unesko ekster la kutimaj rutinaj formoj, kiuj ne kaŭzis novan dinamikon en la movado, ĉar mankas la substanco. La Esperanto-eldono de la *Unesko-kuriero*, kiu lastatempe aperis sub ĉina gvido kaj la aŭspicio de UEA, certe estas atingo laŭ la principo 'nice to have', kiu taŭgas ĉefe por la propagando, same la alparolado de iu TEJO-aktivulo en la ĝenerala konferenco de Unesko en novembro. Tiuj modestaj aktivecoj, per kiuj oni povas fanfaroni, celas pruvi, ke Esperanto ankoraŭ ekzistas. Tamen, neniu ŝtato aktive subtenas Esperanton laŭ la ideoj de la rezolucioj de 1954 kaj 1985, kiuj havas neniun realan signifon kaj utilas maksimume kiel simbola

sukceso kaj por ekspoziciaj objektoj en polva muzeo. Neniu alia krom la esperantistoj konsideras sian projekton signifa, grava, utila kaj necesa. Ankaŭ la Zamenhof-jaro 2017 trovis nur malgrandan intereson ekster la Esperanto-movado. Sed pri tiu mizero kulpas ĉefe UEA, kiu perdis sian signifon, kiun ĝi eble iam havis, precipe en la tempo de la komunismo. La rezultoj prezentitaj de la Esperanto-movado estas magraj. En la „ekstera mondo“ Esperanto apenaŭ ekzistas, al la juna generacio Esperanto mankas la kono pri ĝi. UEA ankaŭ ne havas la saman valoron kiel multaj aliaj NROj kiel Amnestio Internacia, Human Rights Watch aŭ Greenpeace.

Kaj Unesko certe havas aliajn prioritatojn ol okupiĝi pri Esperanto, kiu estas lingvo sen veraj signifo kaj influo en la mondo. Sed pri alia grava punkto ĝi ĵus decidis: la aktoj de la unua Aŭŝvic-proceso estis akceptitaj kiel germana parto de la *monda dokumenta heredaĵo*, kiu konsistas precipe el bibliotekaj kaj arkivaj valoraĵoj. Supozeble, tiu decido helpos iom trankviligi la israelanojn. Cetere, du jarojn antaŭe Unesko akceptis la „Ciferecigitan kolekton pri lingva diverseco“, kiu rilatas al dokumentaro pri 102 lingvoj kaj kulturoj, inter alie temas pri multaj indiĝenaj idiomoj, kiuj estas minacataj de elmortado. Tiu projekto ja povus interesi la Esperanto-movadon. La monda dokumenta heredaĵo estas projekto, kiu evidente estas ĝenerale pli malmulte konata kompare kun la listo de la monda kultura heredaĵo, al kiu trafi la esperantistoj esperas pere de la alpreno de Esperanto kiel monda nemateria kultura heredaĵo, kio tamen estas tre malverŝajna. La ekzisto de la *monda dokumenta heredaĵo* kondukis min al jena ideo: La Esperanto-movado eble provu proponi, ke ĝiaj diversaj planlingvaj arkiv(aĵ)oj (Vieno, Roterdamo, La Chaux-de-Fonds, Londono, Munkeno, Berlino) estu akceptitaj kiel monda dokumenta heredaĵo, por eviti ilian perdiĝon kaj pereon, kaze ke la direktoroj de tiuj bibliotekoj iam eble decidus forĵeti la tutan stokon, ĉar temas pri senutila materialo, kiu laŭ ilia opinio ne estas konservenda por la homaro.

Andreas Künzli, novembro 2017

© [www.planlingvoj.ch](http://www.planlingvoj.ch) / [www.zamenhof.ch](http://www.zamenhof.ch), novembro 2017



Audrey Azoulay (Wikipedio)

Salutvortoj de Audrey Azoulay, 2018

[http://www.ilei.info/agado/2018-07-15\\_Raporto\\_pri\\_trimonata\\_periodo.pdf](http://www.ilei.info/agado/2018-07-15_Raporto_pri_trimonata_periodo.pdf)  
[https://uea.org/pdf/uk2018/UKKuriero\\_4.pdf](https://uea.org/pdf/uk2018/UKKuriero_4.pdf)

Utiligitaj fontoj

<http://www.faz.net/aktuell/politik/ausland/franzoesin-audrey-azoulay-zur-neuen-unesco-chefin-gewaehlt-15286369.html>

<https://www.derstandard.de/story/2000067817189/audrey-azoulay-ist-die-neue-unesco-chefin>

<http://derstandard.at/2000067604596/Neue-UNESCO-Chefin-Azoulay-setzt-auf-Dialog-mit-USA-und>

<http://www.dw.com/de/eine-weltbuergerin-wird-unesco-chefin/a-41332019>

<https://www.srf.ch/news/international/neue-unesco-direktorin-das-sind-azoulays-groesste-herausforderungen>

<https://www.nzz.ch/international/wie-die-besetzung-des-unesco-chefpostens-zum-schauplatz-der-katar-krise-wurde-ld.1321735>

<https://www.welt.de/debatte/kommentare/article141914839/Die-UN-sind-mindestens-so-versumpft-wie-die-Fifa.html>

<http://www.theeuropean.de/wolfram-weimer/12964-schwere-legitimationskrise-der-unesco>

<https://www.bluewin.ch/de/news/wissen---technik/2017/10/24/kommt-die-prozessakte-auschwitz-ins-welterbe--unesco-beraet.html>

<http://www.juedische-allgemeine.de/article/view/id/30085>

<http://www.zeit.de/wissen/geschichte/2017-10/unesco-auschwitz-prozess-akten-weltdokumentenerbe>

[https://en.wikipedia.org/wiki/Hamad\\_Bin\\_Abdulaziz\\_Al-Kawari](https://en.wikipedia.org/wiki/Hamad_Bin_Abdulaziz_Al-Kawari)

[https://de.wikipedia.org/wiki/Audrey\\_Azoulay](https://de.wikipedia.org/wiki/Audrey_Azoulay)

[https://de.wikipedia.org/wiki/Andr%C3%A9\\_Azoulay](https://de.wikipedia.org/wiki/Andr%C3%A9_Azoulay)

<https://www.maguytran-pinterville.com/2016-singe-marrakech/mb6-3-macma-fondateur-nabil-el-mallouki> (foto kun Katia Bami)

<https://de.wikipedia.org/wiki/UNESCO>

<https://de.wikipedia.org/wiki/Weltdokumentenerbe>

[https://de.wikipedia.org/wiki/Digitale\\_Sammlungen\\_zur\\_sprachlichen\\_Vielfalt](https://de.wikipedia.org/wiki/Digitale_Sammlungen_zur_sprachlichen_Vielfalt)